

[noto] fonto: "budhana kuriero", n-ro 2518-2, 1975 (B.E. 2518)

reapero: "La Esperanta Budhano", n-ro 14, 2015 (B.E. 2558)

## *La Principoj kaj Metodoj de l' Vekiĝo al Rekta Kompreno de l' Realo*

**C. Njanasato Mahathero, Cejlono<sup>1</sup>**

La Principoj kaj Metodoj de l' Vekiĝo al Rekta Kompreno de l' Realo, la KORO de l' Budhismo, estas klaraj kaj simplaj. Ili estas la Kvar Noblaj Verroj pri sufero, la estiĝo de l' sufero, la ĉeso de l' sufero, kaj la Nobla Okera Vojo gvidanta al la ĉeso de l' sufero. Tiuj kvar verroj estas la speciala kaj origina instruo de la Vekiĝinto, kiu estas ankaŭ nomata la Iluminulo aŭ la BUDHO. Tiuj ĉi kvar noblaj verroj, la KORO de l' Budhismo originala, troviĝas plej bone klarigitaj en la frua Budhismo kaj nenie en la aliaj sistemoj, kaj certe ne kun tiuj simpleco, perfekteco kaj klareco, per kiuj ili estas proklamitaj de la Vekiĝinto. Tiuj ĉi kvar verroj neniam estis instruataj al la novuloj sen preparo por kompreni kaj akcepti ilin.

Al nova disĉiplo, speciale al la laika vizitanto, la Majstro unue parolis pri la malavaremo aŭ donemo, pri virto aŭ la plenumo de moralaj devoj kaj principoj, pri la bonaj rezultoj de donemo, virto kaj bona vivmaniero en tiu ĉi mondo kaj pri vivo, atingotaj en sekvaj renaskiĝoj en pli feliĉa mondo kaj vivo. Vidante, ke la aŭskultanto ŝatas kaj aprobas tian parolan instruon, la Perfektulo montris en multaj trafaj metaforoj la mizeron de ĉiaj sensaj plezuroj; li elmontris aŭ malkovris al la aŭskultanto la nekontentigan naturon de ĉiaj sensaj plezuroj kaj klarigis la beatan staton, kiu sekvas la forlason kaj rezignon de ĉia sia soifa deziremo, avido kaj sopiroj mondecaj.

Vidinte, ke la koro de la aŭskultanto akordiĝis kaj fariĝis impresiĝema kaj alirebla al la kompreno de la plej alta vero, la Budho konvinke montris per efikaj bildoj, ke vivo, ĉu en nia, ĉu en alia mondo kaj vivoformo, ĉu en la ĉieloj, ne estas la plej alta kaj pura feliĉo, ĉar pro sia nedaŭro ĝi ĉiam kondukas al nova renaskiĝo kaj ripetata sufero.

La radiko, la ĉefa kaŭzo, de ĉia sufero estas la soifa deziremo aŭ sopiro por sensaj plezuroj kaj ĝuoj, por la daŭrigo de la vivo, kaj eventuale por la ĉeso de vivo. Se tiu triobla deziremo ĉesas, ĉia sufero estingiĝas. La vojo al la estingo de ĉia sufero estas la Nobla Okera Vojo, nome virta vivo, kulturo mensa kaj spirita, kaj vekiĝo de la saĝo liberiga, la rekta kompreno de la realo. La akiro de tiu saĝo signifas la intuitivan<sup>2</sup> [tiell]

---

<sup>1</sup> pri la aŭtoro bv. legi la retpaĝon: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Martin\\_Novosad](https://eo.wikipedia.org/wiki/Martin_Novosad)

<sup>2</sup> eble "intuician"?

komprenon aŭ ilumiĝon kaj vekigon el la iluzio. Tiu vekigo rezultiĝas en liberiĝo de ĉia deziremo kaj tial de ĉia formo de sufero.

'Virto, meditado, saĝo, vekigo, liberiĝo' estas la plej konciza resumo de la Nobla Okera Vojo al la Vekigo. 'Donemo, virto, kaj mensa kulturo per kontemplado' estas la sama vojo kaj metodo sekvata de laika budhano, sekvanto de la Vekiginto. 'Aŭskultu kaj studu, memoru kaj plenumu la devojn per sekvado de la Instruo de la Dharmo' estas la sama vojo kaj metodo laŭ tiu resumo. La studo de la Dharmo kondukas al ĝia apliko kaj plenumo, kaj la aplikado kaj plenumado de la instruo pri vekigo kaj ilumina liberiĝo signifas progreson, evoluon kaj disvolvon de spiritaj kapabloj, faktoroj mensaj, kiuj kondukas al la efektivigo de l' vekigo, kaj al la ilumina liberiĝo.

La kritikema leganto de nia ekspono de la Dharmo miros pro la ofte ripetataj vortoj 'Ilumiĝo', 'Liberiĝo', 'Vekigo' aŭ 'Ilumina Liberiĝo'. La vortoj uzataj en tiu ĉi kunteksto signifas la staton de menso atingitan de la Budho dum la mateniĝo de sia budhiĝo kaj plena aŭ perfekta VEKIĜO. La klara elkompreno de la vero, ke ĉia formaĵo aŭ formado (sankhara), ĉia fenometo kaj stato, eĉ la plej granda plezuro monda, estas nedaŭra, nekontentiga kaj senesenca, ne mia memo, ne nia mio, aŭ ia vera absoluta esenco supozata enesti en ĉio, kondukas al la definitiva kaj daŭra ĉeso de ĉia postulemo, soifa deziremo kaj sopiro pri io ajn en la mondo. Pro tiu profunda kompreno dum fortega koncentriĝo spirita oni liveriĝas de ĉia iluzio, nescio, de ĉia deziremo kaj de ĉia sopiro; oni atingas la staton, kiun oni nomas en la palia lingvo NIBBANA, sanskrite NIRVANA. Oni kutime ne atingas la plenan nirvanan vekigon hazarde kaj subite, sed nur per sistema kulturado de la kapabloj atingi la puperan vekigon. Estas gradoj de la atingo, nomataj la supramondaj (lokuttara) statoj kaj gradoj de la vekigo. Per metoda kaj sistema aplikado de la vojo al la vekigo oni atingas la supron de tiu vekigo kaj enlumigo. La tuta sistemo de la instruoj Budhanaj estas la klarigo de la progreso en tiu direkto.

Laiko montranta emon kaj inklinon kaj taŭgecon al tia kulturo, rezignas ĉion mondecan kaj eniras senhejman vivon de la sanghano en la ermitejo, por tie sub la gvido de la instruisto dediĉi sian tutan vivon al la vekigo kaj poste al la instruado de la metodo al aliaj studentoj kaj kandidatoj. Kiuj post eksperimentado trovas, ke ili ne taŭgas por tia tasko, revenas al la vivo laika, kaj laŭgrade akiras maturecon por la vivo sanghana.

Krom tiaj instruistoj de la Dharmo, multaj eniras solecon por kelka tempo dum sia libera tempo, for de la bruo de la urboj kaj amasoj, kaj tie en silento, post la studo de la metodo, oni pasigas sian libertempon en la aplikado de la Dharmo, intensive, laŭ sia matureco kaj kapabloj. La verkinto eksperimentis du jarojn en la montaro Karpata en Slovakio antaŭ ol senti sin preta sanghaniĝi en Cejlono.

Esperantistoj povus retiriĝi al la Verdanta Ermitejo en Cejlono<sup>3</sup>, se veturado ne kostus tiom da mono, kaj se ŝanĝo al vivo en la Tropikoj ne postulus santaŭan al kutimiĝon kaj perdon de multa valora tempo. El la okcidentanoj venintaj kun tia intenco nur tre malmultaj restas, la plej multaj seniluziiĝas kaj revenas hejmen. Tial la instruistoj de la Dharmo konsilas ĉiujn kandidatojn dum la somero trovi en sia loko taŭgan kvietan solecan lokon, invitantan al tia kvietaj laboro por horoj kaj tagoj, eble semajnoj, se oni ne estas bezonata vivi en la societo de siaj familianoj.

Tiuj ĉi linioj servu al la instigo de tia komenco hejme antaŭ foriro en senhejmecon malproksime en la Oriento por atingi Vekiĝon al la Rekta Kompreno de la Realo, de sia persono kaj sia vivo, kaj de la mondo ĉirkaŭanta nin.

---

<sup>3</sup> Radio Vatikano raportas jene (19.09.1971)

Laŭ informo de la esperanta novaĝ-agentejo "PILO-PRESS", budhana monaĥo Sanghano Njanasatta Thero, delegito de Universala esperanto-asocio en cejlona urbo Bandarawela, varme invitas esperantistojn viziti lin. Interesuloj povus ankaŭ resti en Bandarawela, fariĝi monaĥoj kaj kunhelpi en la eldonado de budhanaj libroj kaj revuoj. En sia invitletero, la budhana monaĥo detaligas, ke la ermitejo havas 12 ĉambrojn, vastan halon por prelegoj, bibliotekon, verandojn kaj koridorojn, ĝardenon kun frukto-arboj. Se iu aŭskultanto hazarde trapasos Cejlonon, aŭ se iu intencas fariĝi budhana monaĥo, ne forgesu la inviton de samideano Thero. Por eventualaj interesitoj pri monaĥiĝo en Cejlono, ni aldonas, ke estas postulitaj nur kelkaj kondiĉoj: al kutimiĝi al la nova manĝaĵo, klimato kaj vivmaniero, kaj lerni... almenaŭ tri lingvojn, nome sinhalan, palian kaj anglan!